



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 11 Novembro, 2010

Kara Leganto! Kiel kutime, la redakcio ricevis kelkajn mesaĝojn de la dankemaj legintoj de la bulteno. Bedaŭrinde pro la nekonataj kialoj dum la oktobra kunsido planita preleganto ne elpaŝis, pro tio la ĉefartikolo de la novembra numero de "Saluton!" estas dediĉata al aliaj temoj. Ni ankaŭ informos vin pri la tempo kaj ĝusta loko de la Zamenhofa tago'2010, konatigos kun E-grupo de Arizono, rakontos pri la novaĵoj de E-filmindustrio kaj E-poezio –La Redakcio

Zamenhofa Tago: La ZT'2010 okazos la 12an de Decembro en la sama loko, kie pasintjare: 415 Howard Street, Evanston, IL 60202. La gast-salono estos je nia dispono inter 12 kaj 4 pm. Plian informon vi ricevos de la decembra numero de Saluton! –LOK

Verda Domo de Arizono



Iom ŝtorm-simila vivo de printemp-somero lacigis min kaj aŭguste min vizitis la penso: iri al iu senhoma loko por ripozi kaj renovigi la perditajn viv-fortojn. Kaj mia elekto trafis ĝuste la Verdajn Domon de Arizono, kie mi havis plezuron esti antaŭ 4 jaroj (vidu Saluton! 02/07). Dirite – farite! La 31an de Oktobro flugmaŝino surterigis min en la internacia flughaveno de Fenikso – Sky Harbour. Poste mi elspezis nur 10 minutojn kaj 20 dolarojn por atingi la gasteman Esperantejon de s-ino Anĝelino (sur la foto).

En Arizono, la Grand-Kanjonaj Ŝtato, oni povas ĝui tricent tagojn da blua ĉielo dum jaro. La E-domo lokiĝas en la koro de la urbo Fenikso, sed proksime oni povas grimpi montojn, promeni ĉirkaŭ lagoj, kapti fiŝojn, viziti muzeojn, bibliotekojn, ŝtatan universitaton, bestoĝardenon kaj viziti la Grandan Kanjonon! Ĉe la domo gastoj povas ĝui bibliotekon, naĝejon, hejtitan bankuvegon, saŭnon, ekzercejon, biljard-tablon...

Ankaŭ la Verda Domo estas la kerno de la loka E-movado. Mi havis eblecon konatiĝi kun la sperta E-isto Ronaldo Harvey, tralegi kelkajn E-librojn de Edvin Grobe. Pri la lasta: li tradukis novelon de la usona verkisto Henry James (1843-1916) "Darzinjo

Milero" (Daisy Miller, 1878). Li verkis ankaŭ 100 originalajn poemojn pri la sud-orienta ŝtato Arizono kaj ties riĉega proviso da antaŭhistoriaj, historiaj kaj nuntempaj kulturaj tempoj Indian- kaj Eŭrop-amerikaj. Jen estas unu el sonetoj pri Sagvar-kakto:

Mi malcertas kiel nomi vin, Titan-kakto

De Sonoroa Dezerto. Estas la fakto

Ke vi aspektas kiel giganta soldato

En sentinel deĵorado; kiel frato

De monaĥa ordeno en muta preĝado

Rimorsa; kiel kandelingo en starado

Apudtrona; kiel dornstango protektanta

Ogrohalon; kiel kolono subtenanta

Moskean kupolon. Tamen kiam alvenas

Mezjunio kaj viaj fruktoj maturiĝas

Kaj el ilia sukera suko fariĝas

Sankta ceremonivino, nr plu mi penas

Eltrovi nomon por vi. De monto al monto,

De valo al valo, mi baptas vin "Vivfonto!"

Por kompreni la soneton, nepre vizitu la Verdajn Domon de Arizono! –Araneo



E-filmo "Senmova"

Antaŭ kelkaj monatoj la esperantista mondo surprize eksciis pri esperantlingva mallonga filmo, kiu jam pasintjare estis sukcese prezentita en kelkaj kinofestivaloj. La filmon faris neesperantisto el Turkio, Tuğçe Madayanti Sen (sur foto). Ŝi estas reĝisoro, scenaristo kaj fotisto; finis siajn studojn pri filmado en la Universitato de Cincinnati en Usono, kie ŝi ricevis plurajn premiojn. Post tio, ŝi laboris en usona televidkanalo kaj poste revenis en Turkion, kie ŝi laboris por Istanbula televido kaj por filma studio. Ŝi ankaŭ faras doktoriĝon en departemento de arkeologio, kaj laboras kiel sendependa filmisto. "Saluton!" kontaktis ŝin kaj invitis al nia Zamenhofa Bankedo: kvankam s-ino Tuğçe ne promesis ĝuste, sed ŝi permesis al nia E-societo trarigardi la filmon dum la festo, skribinte: "Mi scias pri la esperantista movado, mi ne scias, kial mi ne estas parto de ĝi "oficiale", sed en mia koro kaj menso mi naskiĝis esperantisto, certe!" Koran dankon, nia dume ne E-lingva samideanino! Dum la Zamenhofa tago vi havos eblecon ne nur spekti la filmon, sed ankaŭ estos informataj pri E-kinofarado.

—Redakcio

"La Amo Unua"

Ni havas plezuron prezenti ankoraŭ unu pecon de E-literaturo, ĉi foje – tradukita, kontribuas kun sia elrusigo el Jan Torĉinskij (1934-2009) membro de nia E-societo, E-poeto kaj tradukanto Gregoro Dolgin:

Al junulino Valinjo

**Ne timigis nin dornoj prunelaj. Kaj malgraŭ
Nia sorto disiĝa kaj tempo multjara,
Mi memoras pri vi, radieto arĝenta,
Ekde l' aĝo infana dum kruela milit'**

**Ŝajnas via vizaĝ' jam duonforgesita,
Kaj la voĉo degelis en longa distanco.
Regas plu grizaj tagoj. Sed kvazaŭ Hosana,
Sonas en mia kor' via nomo kolomba.**

**Kiel ĝoj' gratifika kaj puno samtempa,
Frumatene vi venas al mi virtuale:
Mi timeme tuŝetas vin, tamen fin-fine
Ho, Valinjo, mi volas al vi amkonfesi.**

**Kreskis floroj sur cindro, tra plor' postbrulega,
Kreskis nia amara junec' postmilita.
Pasis multaj eventoj, atingoj, eraroj...
Ne disiĝos ni plu, radieto arĝenta.**



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses
of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the
Esperanto Society of Chicago,
and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Novembro – H. Perez revenis
kaj...

12an de Decembro – tradicia Zamenhofa
Tago

25an de Januaro – d-ro Kordylewski:
"Bahaa kredo"